



OKTOBRO 2016



La «Espéranto-Gironde» Informilo

N° 148

La 3an de julio Montendre Esperanto Grupo



festis sian 20jaran jubileon

EŬROPA FESTIVALO DE CHATILLON SUR INDRE

De la 13a ĝis la 17a de julio okazis la 8a Eŭropa Festivalo en Châtillon-sur-Indre. La Kompanoj ĉeestis kaj varme partoprenis en tiu bela aranĝo.

Châtillon-sur-Indre estas ĉarma mezepoka vilaĝo de ĉirkaŭ 2700 enloĝantoj, en departemento Indre. En la centro staras belega kastela turo, kaj la vilaĝo konservas restaĵojn de malnovaj stratoj kaj domoj.

La Eŭropa Festivalo konsistas en la vizito, dum 5 tagoj, de junulaj delegacioj el 18 eŭropaj landoj (ĉijare propranome partoprenis ankaŭ francaj esperantistoj, kiuj membras en La Kompanoj...). Tiuj junuloj montras, kio estas iliaj landoj, kaj prezentas en diversaj okazoj dancojn, muzikojn ktp. de siaj landoj, ĝenerale vestitaj per ege belaj naciaj kostumoj.

Jam en la vespero de la 13a de julio, okazis torĉa procesio, kiun antaŭis multkolora iluminado de la kastela turo. Nia grupo (dekkvino da homoj) marŝis sur la stratoj en la granda procesio. Ĉirkaŭitaj de buntaj paperaj lanternoj, ni kantis kelkajn el la Lillaj kanzonoj, kun la akordiono de FAMO, la gitaro de Pjer kaj la suzafono de Bernard. Ni alvenis al granda placo, kie estis instalita foira festo, kaj ligna stangaro estis bruligita en la nokto, dum ekflugis tiuj «tajlandaj lanternoj», iaspecaj etaj varmaerostatoj, kiuj suprenŝvebas en la aero kaj iĝas moviĝantaj steletoj. Denove ni kantis unu-du kanzonojn, kun la dorso al la fajro.



FaMo kaj Marcelo antaŭ la fajro

Granda ceremonio okazis la 14an: post denova procesio laŭlonge de la stratoj de la vilaĝo, dum kiuj ni kantis, ni alvenis al la monumento al la milit-mortintoj, kie unu delegito de ĉiu delegacio faris mallongan paroladon honore al paco kaj frateco. Kelkfoje, la parolado estis rekte en la franca, aliffoje, ĝi estis farita en la nacia lingvo, kaj tujtradukita. Nome de la esperantista delegacio Famo faris belan mallongan deklaron, kiu finiĝis per la kantado de *La Strebo*, de Brel, kiun tujtradukis, bele enkadrigite en la muziko, Muriel. Ili forte kortuŝis la multnombran publikon sur la strato.

La posttagmezo estis dediĉita al ralio tra la vilaĝo, kiu ebligis pli bone ekkoni la diversajn vidindaĵojn. La organizintoj penis traduki al la angla kaj al esperanto la ĉefajn indikojn skribitajn sur la laŭvojoj paneloj.

La tago finiĝis per giganta kaj imponega piroteknikaĵo, por kiun vidi, laŭdire, alvenas homoj el ege malproksime... kaj tio estas tute kredinda, tiom splenda estis la spektaklo...



Surstrate kun la Kompanoj

Eŭropa Festivalo ne signifas nur «festo». La 15an de julio estis organizata en apuda urbo Loches interparolado pri kelkaj el la nunaj problemoj en Eŭropo, ĉefe laŭ la vidpunkto de fratecemo. Estis aludita la pli kaj pli mal-trankviliga kresko kaj disvolviĝo de ekstrem-dekstraj ideoj.

Post tiuj interesaj intervenoj de lokaj politikistoj kaj de la loka eŭropa deputitino, ni havis la tempon viziti la kastelon de Loches.



Sur la eŭropa bazaro

La 16a de julio estis la lasta tago de la festivalo. Malfermiĝis granda foiro, sur kiu ĉiu delegacio tenis budon. Pasantoj povis sin informi pri la lando, kaj frandi manĝ-(kaj trink-) specialaĵojn el la diversaj landoj. Ankaŭ Esperanto Indre, dank'al kiu La Kompanoj partoprenis en la festivalo, havis budon. Samtempe la delegacioj, unu post la alia, denove prezentis spektakleton sur podio.

Ankaŭ ni kantis kelkajn kanzonojn,

kiuj plaĉis al la ĉeestantaro. Poste iom post iom la partoprenintoj reiris hejmen.

Tre belan memoraĵon ni konservas de tiuj tagoj, kaj ni varmege dankas al Nicole Blot, el Espéranto-Indre, kiu havis la ideon inviti La Kompanojn partopreni en tiu bela evento. Ni estis dum la tuta tempo de nia restaĵo tre bone prizorgitaj, kaj eĉ unu municipa ĉambro estis je nia dispono, por niaj provkantadoj.

Ni antaŭnelonge eksciis, ke bedaŭrinde, la kontraŭantoj al tiu jam 8-jara bela projekto finfine sukcesis forpreni la vivon de ĝi; sekve tiu festivalo ege bedaŭrinde ne plu okazos. Ja certe, ĝi tute ne kongruis kun la nune ŝvebantaj ideoj. Nuntempe pli bone homoj enmemiĝu kaj fermu siajn okulojn kaj koron je la aliuloj, ĉefe se ili venas de malproksime, ĉu ne?

Janine



Dum la ceremonio

ĈU EŬROPA FESTO NE PLU RAVAS ?

Ĉatijlono-ĉe-Indro estas granda vilaĝo centre de Francio inter Turo kaj Kastelruso. Tie vivadas 2700 loĝantoj.

Ekde la jaro 2008, ĉiun jaron, estas organizitaj ĉirkaŭ la 14a de Julio (dato de franca nacia festo) semajnfina festivalo «Eŭropaj renkontiĝoj». Tial tra la urbo, ĉirkaŭ la mezepoka kastelo, sur la bazarplaco kaj ĉe la riverbordo, kuniĝis partoprenantoj en la oka festivalo de la 13a ĝis la 16a de julio .

Se komence la ideo fontis el interŝanĝo de ĝemelaj urboj, iom post iom pli ampleksiĝis la projekto. Tiel ĉijare pli ol tri cent libervolaj partoprenantoj veninte el dek ses diversaj landoj harmonie pasigis tri festajn tagojn. En la diversaj eventoj en Ĉatijlono estis reprezentitaj krom Francio, Germanio, Hispanio, Latvio, Slovakio, Ĉeĥio, Hungario, Bulgario, Nederlando, Britio, Italio, Pollando, Slovenio, Rumanio, Belgio kaj... Rusio kaj ankaŭ grupo de Grekoj el Parizo! Junaj aŭ ne plu, sportemaj, artistaj aŭ simple fest(en)-emaj, ĉiuj kune manĝis, kantis, dancis kaj diskutis. Kiom da lingvoj praktikitaj? Krom ĉies denaskaj, esence la angla kiel pontolingvo. Ofte gest- signrid-lingvo. Kaj esperanto! Ja, loka esperantoklubo Esperanto-Indre bonintence ŝovis esperantistojn sur la liston de la aktivuloj.



Laŭ la stratoj de la vilaĝo

La inaŭgura ceremonio okazis ĉe la monumento al la milit-mortintoj. Tiam unue arma fanfaro ludis la betovenan eŭropan himnon *Himno al ĝojo* kaj la nacian himnon *La Marsejezo*. Dummomente eblis sin demandi: «Ve! kion do ni faras ĉi tie? Ĉu vere ni miskomprenis la kulturan celon de tiuj renkontoj?» Sed fine de la muziko iu eksterlanda invitito laŭtigis du kro-

majn notojn per «pum! pum!» kantado kaj la tuta placo ekridegis. Poste ĉiu delegacio salutis per pacomesaĝo. Laste sin esprimis FaMo kaj Muriel kantante en esperanto kanton de Ĵak Brel, *La strebo*. Tiu duopo trafe kortuŝis la ĉeestantaron kaj ricevis fortajn aplaŭdojn. Por ke vi trafu la fortan silenton, kiu akompanis la emociojn portatajn de FaMo, vi simple sciu, ke apud li larmis virino.

La antaŭan vesperon longa procesio sekvis la akordionon de FaMo kaj la kantadon de La Kompanoj. Ankaŭ antaŭ la bunta, altkvalita, vespera piroteknikaĵo La Kompanoj muzikas kaj kantis famajn kanzonojn en Esperanto. Sed tio estis nur eroj en la multaj kontribuoj de la koloraj delegacioj. Komunaj grekaj dancoj, rusaj kvazaŭbaletoj, polaj grupkantoj... Ja kelkaj vilaĝanoj iel mokeme ridetis al la folkloraj kostumoj de la reprezentantoj de la orienteŭropaj landoj. Eble ĉar okcidentanoj tro ofte pensas, ke ridindas folkloriĵoj. Vilaĝaj ritoj malaperis nome de progreso. Nu konstateblas, ke okcidentanoj ne plu kapablas surmeti tradiciajn vestojn eĉ okaze de festo, en kiu ili povus reliefigi sian lokan teksaĵan kulturon. Ĉu ne estas domaĝe, ke ne plu eblas distingi diversecon de la vestoj, ĉar ĉiu vestas sin per samstilaj markoj same aĉeblaj ĉie ajn tra la mondo? Imagu, ke por iel distingi sin nederlandanoj vestis sin per oranĝkolora futbala ĉemizo. Jen, kiel koloro de la nacia futbalteamo iĝas tradicia nederlanda vestaĵo! Ĉu amuze?



Bunta homamaso

Dum mateno en proksima urbeto *Loŝo (Loches)* politikistoj lokaj, naciaj kaj eŭropaj, laŭdis Eŭropon, provante konvinki ĉiujn aŭskultantojn pri la necesa kontribuo de la eŭropaj instancoj al la ĉiutaga vivo de ĉiu eŭropano. La lastan tagon, kvazaŭ por kampara foiro, sub tendegoj, ĉiuj delegacioj animis landajn budojn. Kompreneble ankaŭ esperantistoj fiere deĵoris por prezenti la interncian lingvon dum ĉirkaŭe eblis frandi diversajn specialaĵojn, trinki alkoholaĵojn, informiĝi por turismi, ludi, akiri etkoste manlaboraĵojn, ktp. Denove sur scenejo sinsekvis buntaj kantoj kaj multritmaj dancoj. Ĉio en tre simpatia etoso. Esperantistoj rajtas nur bedaŭri, ke ne ĉiuj scipovas la interncian lingvon. Ĉar interŝanĝoj estus tiel pli facilaj, profundaj kaj riĉaj! Tamen ĝojindas partopreni en tiu festivalo!

Notindas, ke Genoveva, la instigantino kaj ĉeforganizantino de la «renkontiĝoj» estas la edzino de la Ĉatiljona urbestro. Dum la du pasintaj jaroj, horojn ŝi dediĉis al la preparado kaj kunordigado de tiu loka festivalo. Ja ĝi modestas, sed tamen vige aktivas. Sed ve! Abrupte trafas nin gazetartikolo: Finite! decidis la urbestro. Trikvaronoj de la konsilantoj voĉdonis kontraŭ la urbestra propono! Do ne plu okazos tiuj «Eŭropaj renkontiĝoj». Kial do? Ĉu pro monfiasko? Tute ne! Genoveva sukcesis ricevi monsubvencion (150 000 €) de Eŭropa Unio por tri sinsekvaj festivaloj kaj interŝanĝoj en kvar landoj. Male do, la urbodomo devos repagi la jam ricevitan ĉijaran subvencion (60 000 €) pro tiu ĉesdecido.

Ĉu, fermante siajn pordojn al tia okazaĵo, Ĉatiljono ne sentigas iun naŭzan atmosferon, kiu pli kaj pli sterniĝas en tro multaj landoj tra la mondo? Kien vojaĝu junularo, se ne por trovi gastemajn lokojn, kie eblas renkonti malfermajn homojn? Ĉu eĉ en riĉa vilaĝo, centre de Francio, kiu ne suferas pro problemoj ligitaj al enmigrado, la faŝistaj konceptoj de la ekstremdekstrularo (Nacia Fronto) sukcesis forpeli fratecajn kaj egalecajn respublikajn fundamentojn? Kompreneble ne eblas tuj respondi al tiuj demandoj, ĉar ne tiel aplombe agas la perversaj insiduloj. Tamen indos venontan majon per lupeo kontroli la rezultojn de la voĉdonoj por la Respublika Prezidento...

Esperanto plu estu prezentata al eŭropa junularo ema al renkontoj. Esperantistoj restu junaj tiucele!

Marcelo Redulez



FaMo kaj Muriel interpretas *La Strebo*-n

20-JARA JUBILEO DE MONTENDRE ESPERANTO GRUPO

En oktobro 1995 estis proponata al la montendranoj kurso pri esperanto. Tiutempe, mi laboris en la mezlernejo de Montendre, kaj havis la permeson organizi la kursojn ene de la lernejo. Ĉiujare, de tiam, eta grupo de ses ĝis dek personoj sin retrovis ĉiusemajne por lerni kaj praktiki la lingvon.

La grupon baldaŭ ŝirmis sub sia alo *Espéranto-Gironde*. Pluraj membroj de la montendra grupo de tiam membras en la ĝirondia grupo, kaj tiel partoprenis en multegaj staĝoj, kunvenoj, eĉ preparoj kaj deĵoradoj por pluraj kongresoj (SAT-Amikaraj aŭ IFEFaj). Iuj eĉ eniĝis en la grupon La Kompanoj kaj partoprenis en la spektaklo « La magia trajneto » dum la IFEF-kaj FEI-kongresoj de 2013, kaj, elstara spertaĵo, en la nacia spektaklo de la Lilla kongreso de 2015.

Dum la ĉiusemajnaj renkontiĝoj, ni ŝatas traduki. Kaj, dum la jaro ĵus pasinta, nia grupo preparis spektakleton, cele al kiu ni tradukis plurajn partojn de la teksto de François Morel *Hyacinthe et Rose*.



La 3an de julio, ni finfine povis festi nian 20an datrevenon! Ni preparis donacetojn por ĉiuj partoprenantoj de la festo (dudeketo da): turisma libreto pri la kastelo de Montendre (en la franca, ni ne havis la tempon ĝin esperantigi) kaj skatoletoj propramane faritaj kaj ilustritaj!

La spektaklo *Hiacinto kaj Roza* miksas leg-ludadon de tradukitaj paĝoj elektitaj el la originalo (far pluraj membroj de la grupo, kiuj ludis diversajn rolojn de la rakonto) kun lumbildaro.

Post la festa manĝo, ni ĉiuj iris por viziti la kastelon de Montendre, kiu prezentis post laboregoj kaj pro arta evento novan aspekton.



Ludlegante, Lucienne, Micheline, Cécile, Janine

Ni rakontis al niaj gastoj pri la duko de La Rochefoucauld, markizo de Montendre, kiu ekziliĝis al Brita regno en la tempo de Ludoviko la 14a, pro tio ke li estis Protestanta. Li kuraĝe batalis por la brita reĝo (tamen neniam kontraŭ Francio), tiel ke li fariĝis marŝalo kaj estis entombigita en la abatejo de Westminster. (vd.p.10)



En ludomezo, Christiane, Michel, Liliane

Ni finis tiun tre agrablan tagon per kunkantado de novaj aŭ jam konataj kanzonoj.

La lokaj ĵurnalistinoj nin vizitis kaj raportis en la lokaj gazetoj pri tiu festo.

Denovan dankon al ĉiuj partoprenintoj!

Janine

Dudek jaroj!

La 3an de julio, estis la festo de la dudek jaroj de M.E.G. (Montendre Esperanto Grupo).

Dum la jaro, ni tradukis plurajn ĉapitrojn de la libro de François Morel: *Hyacinthe et Rose* .

La tagon de nia ferio, ni prezentis dialogitan legadon de la traduko, antaŭ multaj geamikoj!

Poste, estis la manĝo: multaj tre bonaj manĝoj, alportitaj de ĉiuj.

Dum la posttagmezo, ni promenis al la kastelo de Montendre.

Dankon al la geamikoj , kiuj venis por partopreni en nia festo!

Lucienne



Memorinda tago!

MONTENDRA MARKIZO ENTOMBIGITA EN WESTMINSTER

Historio foje estas stranga, kaj kaprica estas la postmorta famo. Sufiĉis misa traduko, por ke la glora sorto de François de La Rochefoucauld estu tute forgesita dum tri jarcentoj!

Entombigita en Westminstera abatejo post prestiĝa kariero en la brita armeo, François de La Rochefoucauld (1672-1739), markizo de Montendre, ricevis ĵus antaŭ sia morto, la alte honorigan titolon «*Marshal of Great Britain*»... bedaŭrinde erare tradukita ĉe la franca flanko per «milita marŝalo», kio estas tute alia afero!

Dank'al streboj kaj esploroj de iu el liaj parencaj posteuloj Armand de La Rochefoucauld, duko de Doudeauville, la markizo de Montendre, kies milita kariero estis aparte heroa, finfine alvenas al postmorta famo. Tiu kalvinano, kiu forfuĝis el Francio pro religiaj persekutadoj far Ludoviko la 14-a post la Nuligo de la Edikto de Nantes, alvenis al Anglio kaj engaĝiĝis ĉe la brita armeo.

Respektante sian promeson neniam batali kontraŭ francoj, li estis tiel ekzempla oficiro, ke li ricevis tiun prestiĝan titolon «*Marshal of Great Britain*». (Inter 1736 kaj 1997 nur 138 eminentuloj estis promociitaj al tiu rango, inter kiuj Duko de Wellington, marŝalo Montgomery, kaj nur du francoj, nome marŝalo Foch kaj li.)

Tempo pasis, kaj la surskribaĵoj sur la tomba ŝtono forviŝiĝis. La duko de Doudeauville proponis ĝin anstataŭigi kaj la Dekano de la abatejo sugestis, ke la ŝtono venu el la naskiĝregiono de la markizo.

Tial en majo 2012 Armand de La Rochefoucauld renkontis la urbesbron de Montendre por sciigi al li pri sia serĉo: ŝtono el la regiono de Montendre, plej altkvalita, ege rezistema por sekure elteni la paŝadon de la multnombraj turistoj, kiuj ĉiujare vizitas Westminster-on. Efektive la tombo situas en la norda ambulatorio de la abatejo.

Ĉe tiu belega okazo valorigi la historion de la urbo, la urba konsilio voĉdonis por la aĉeto kaj gravurado, far loka ŝtontajlisto, de la ŝtono donacota al la Westminstera abatejo.

La dediĉadon ĉeestis la ambasadoro de Francio en Britio, multaj anoj de la familio La Rochefoucauld kaj reprezentantoj de la brita kaj franca armeoj.

Eltiraĵo de la parolado de John Hall, Dekano de Westminster, dum la ceremonio de la 15-a de januaro 2013:

«La 15-an de aŭgusto 1739, François de La Rochefoucauld estis tie ĉi entombigita, dankcele al la elstaraj servoj, kiujn li faris al la armeo de la Brita Krono ekde 1692, en Irlando, Nederlando kaj Portugalio. Forfuĝinte el la religiaj persekutadoj en Francio, li batalis flanke de sia samlandano, same kalvinano, la Grafo de Galway, dum la antaŭeniĝo al Madrid dum la Hispana Heredmilito en 1706. Li samjare iĝis kolonelo de la regimento de Dunganon. En 1728 li estis farita « Marshal of the Ordnance » (stabestro de ĉiuj britaj armeoj) en Irlando kaj komence de julio 1739 li estis promociita al la rango de « Field Marshal » (Marŝalo de Britio). Hodiaŭ ni celebras tiun noblan filon de Francio kaj ties fratecan engaĝiĝon ĉe apuda reĝlando. Ni honorigas lian memoron kaj tie ĉi lokas, por signi lian lastan loĝejon, novan ŝtonon el la mino apud lia naskiĝurbo Montendre.»

Kelkajn monatojn poste, la 4an de januaro 2014, la malnova ŝtono de la londona tombo de François de La Rochefoucauld siavice traveturis maron Manikan por atingi Montendre-n, kie ĝi de nun plu kuŝos, videbla de ĉiuj, piede de tiu kastelo, kiu iam apartenis al la familio de François de La Rochefoucauld.

El *Echos de Montendre*, februaro 2013 kaj februaro 2014
Esperantigis Janine



Grupe antaŭ la originala tombŝtono de la markizo

ESPÉRANTO VENDÉE FÊTE SES 20 ANS À LA ROCHE-SUR-YON SAMEDI 24 SEPTEMBRE 2016

Les Kompanoj venus des quatre coins de France et les espérantistes de Vendée ont mêlé leurs voix pour fêter les 20 ans de l'association sur la très belle et attractive place Napoléon à La Roche-sur-Yon samedi 24 Septembre.

Après une matinée d'échauffement vocal et de répétition des chansons traditionnelles françaises traduites en espéranto, telles que *Y'a de la joie*, *Quand on n'a que l'amour*, *Les copains d'abord*, etc. la joyeuse petite troupe s'est rendue en début d'après-midi sur la place au cœur de la ville. Dans cet espace constitué de bassins insolites, une sonorisation avait été mise en place par les services municipaux.



Trejniĝo



Sur la placo

Famo s'est mis au micro avec son accordéon, Pierre a branché sa guitare, Bernard a donné le rythme avec son soubassophone et une vingtaine de choristes ont chanté, attirant ainsi les badauds curieux. Le soleil était au rendez-vous et n'a fait que renforcer le caractère exceptionnel et joyeux de l'événement. De nombreuses personnes se sont jointes au chœur grâce aux livrets qui leur étaient proposés et ont découvert l'espéranto.

La journée s'est terminée par un concert. FAMO, accompagné de Pierre et Bernard, a chanté BREL d'une manière magistrale. Les Kompanoj ont chanté avec eux en fin de concert *Kiam restas am nur*. Merci à l'équipe d'Espéranto Vendée pour leur efficacité dans l'organisation de cette belle journée !



Famo kaj la Kompanoj kantas Brel
(fotis H. Masson)

Morine

C.E.E.A. (Cercle d'Etudes Espérantistes de l'Ariege)

<http://esperanto.ariege.free.fr/>

Mairie – FR – 09340 – VERNIOLLE

24-e Stage de Chant Choral *en espéranto*

ski, tourisme & musique folk

du **samedi 11** au **samedi 18 février 2017**

au Village de Vacances de La Bastide l'Hers

Ce stage choral (stage « **A** »), pour le « *Chœur Espéranto-Trans-Pyrénéen* », sera dirigé par la Chef de chœur néerlandaise **Rineke HOENS**, qui dirige plusieurs chorales dans son pays.

Les chants polyphoniques choisis sont issus de différents répertoires de diverses époques.

Plusieurs fidèles participants seront aussi munis d'instruments de musique traditionnelle et nous promettent de belles soirées.

Infos : Georges COMTE - FR - 11420 - LAFAGE

Tel. : (33/0)468 605 417 - <tutpeko@aliceadsl.fr>



FORPASO DE PEDRO SEVILLA LA 1an DE OKTOBRO

Sabaton matene, la 1an de Oktobro, Pedro foriris.

Mardon matene, la 27an de septembro, la flegisto trovis Pedron tere, li falis dum la nokto. Pedro estis transportita al la malsanulejo de La Teste de Buch, lia femurkolo estis rompita. Merkredon, la kirurgo operaciis lin. Poste, li ŝajnis farti bone (jaŭdon), sed en la mateno de sabato li foriris.



Mekcredon, la 5an de Oktobro, okazis la entombigo de Pedro, multaj geamikoj ĉeestis en la tombejo de Gujan-Mestras por lasta, kara omaĝo. Estis ankaŭ Erik lia luksemburga amiko, Bernard S. delegito de Ĝirondia Asocio reprezentanta ĉiujn esperantistajn geamikojn, kiuj deziris sed ne povis ĉeesti.

Unue reprezentantino de nia urbestrino parolis, poste Mireille legis nian omaĝon, poste la esperantistaj geamikoj kunlegis *l'Espoir* (*La Espero* de Zamenhof en franca lingvo) muzike akompanataj de la *Himno de la ĝojo* de Beethoven (ankaŭ eŭropa himno), fine la familio legis poemon.

Laŭ la retejo Kokcinelo (Gujan Mestras Esperanto)

RAPORTETO PRI LA 101-A UK EN NITRO (23a-30a DE JULIO 2016)

La 101-a Universala Kongreso okazis ĉi-jare en Slovakio, en la urbo Nitro, kiu troviĝas en la sudokcidenta parto de la lando, ĉirkaŭ 90 kilometrojn de la ĉefurbo Bratislavo. Ĝi estas ĉarma urbeto, kun proksimume 80 000 loĝantoj. Ĝi estas universitata urbo, tial la kongresejo situas en la Agrikultura Universitato. Laŭ la kongresa libro, ĉeestis 1214 partoprenantoj el 59 landoj. Sed, ni bone scias ke pluraj kongresanoj aliĝas surloke, do sendube entute la partoprenantoj kaj la landoj estis iom pli multnombraj. La alta protektanto de la 101-a UK estis S-ro Andrej Kiska, prezidento de Slovaka Respubliko. Dum la solena malfermo, ĉeestis la urbestro de Nitro, S-ro Josef Dvonĉ, kiu bonvenigis la kongresanojn nome de la Prezidento de Slovaka Respubliko. Se oni rigardas la nomojn de la honora komitato, oni trovas: la ministrojn de eksterlandaj kaj eŭropaj aferoj de Slovaka Respubliko, la rektoron de la slovaka agrikultura universitato en Nitro, la ambasadoron de Slovakio en Belgio kaj Luksemburgo, ktp. Se ni komparas tion kun la 100-a UK de Lillo, oni povas diri ke la 101-a UK estis pli grava ol la 100-a...



Bonvenon en la UK de Nitro!

Nitro: mallonga historio

Nitro estas unu el la plej malnovaj urboj en Slovakio, kiu ekestis sur sep montetoj (same kiel en la eterna urbo: strange, ĉu ne?...). La teritorio de Nitro estas seninterrompe priloĝata de preskaŭ mil jaroj. En Nitro rezidis princo Pribina, kiu konstruigis kaj sanktigis en la urbo la unuan kristanan preĝejon en Slovakio (ĉirkaŭ la jaro 828). En 863 alvenis al ĝia teritorio la tesalonikaj fratoj Konstanteno (poste nomata Cirilo, laŭ lia monaĥa nomo) kaj Metodo por disvastigi la kristanan kredon en sia propra lingvo. Konstanteno alportis la unuan slavan skribsistemon, glagolico, kies alfabeto ankoraŭ estas uzata en la ortodoksa litugio (la slavona). La nuntempa skribsistemo, konata kiel "cirila alfabeto" kaj uzata en la plej granda parto de la slavaj landoj, fakte estas evoluo de la glagolica sistemo. Mi atente aŭskultis tre interesan prelegon pri tio, dum la UK, fare de la fama lingvisto Jouko Lindstedt. Komence de la 12-a jarcento estis fondita ĉe la piedo de la monto Zobor la plej malnova monaĥejo kaj lernejo en Slovakio: la benedikta monaĥejo de sankta Hipolito. En 1248, kiel dankon por defendo en batalo kontraŭ tataroj, la regnes-

tro Belo la 4-a donis urbajn privilegiojn al Nitro. Ĝi restis grava ekonomia centro eĉ dum la epoko de Aŭstrio-Hungario.

UK: etoso kaj aranĝoj

La kongresejo situis ne tro for de la urbocentro: oni povis iri piede dum 15 minutoj. Fakte, la urbocentro estas tute piedira kvartalo, tre agrabla. La ĉefa urbo-placo estas tie, kaj la aranĝoj de la nacia vespero okazis tie. Tial, la tuta loĝantaro povis partopreni, kompreneble senpage. Do, ni tre ŝatis la etoson, kiun kreis tiu humana kontakto inter esperantistoj el la tuta mondo kaj la slovakaj loĝantoj. Mi havas, pri tio, etan anekdoton (nun mi ridetas, sed kiam tio okazis, malpli...). Ni decidis ĉeesti teatraĵon pri la vivo de Zamenhof, kiu okazis en la sinagogo de la urbo (hodiaŭ ĝi ne plu funkcias kiel sinagogo, evidente pro la ekstermado de la tuta juda komunumo dum la dua mondmilito: ni vidis plurajn sinagogojn en Slovakio en la sama situacio). Do, mi rigardis sur la urbomapo, kaj vidis lokon kun juda stelo. Evidente, mi certis ke ĉi tie troviĝas sinagogo. Bone: mi invitis kelkajn aliajn esperantistojn kunveturi kaj enmetis la adreson en la GPS de la veturilo. Ni longtempe veturis, kaj troviĝis preskaŭ ekstere de la urbo. Strange: ni provis demandi al la homoj, sed estis tre malfacile komuniki (neniu el ni parolis la slovakon...).

Do ni revenis en la urbon, kaj finfine ni trovis la sinagogon: ĝi situis tre proksime de nia hotelo! Kio okazis? Fakte, poste mi ekkomprenis! Sur la urbomapo, la juda stelo ne indikis la sinagogon, sed la judan tombejon! Kiam ni finfine alvenis al la sinagogo, kompreneble ni malfruis: la teatraĵo jam komenciĝis, kaj oni ne plu rajtis eniri. Ni protestis, iom laŭte, kaj kelkfoje en la franca. Do: precize pro tio alvenis al ni sinjorino, kiu parolis al ni en la franca. Ŝi ne estis esperantistino, ŝi loĝis en Nitro, sed naskiĝis en Francujo. Delonge, ŝi ne plu havis eblecon paroli en la franca, do ŝi proponis al ni viziti la urbon. Bone: ni konsentis, kaj ŝi ĉiĉeronis nin, en la franca, kaj mi tradukis en esperanto por la aliaj esperantistoj, kiujn mi fuŝveturigis... Ni proponis al sinjorino Jacqueline, jam emerita, akompani nin dum la ekskurso de merkredo, kaj ŝi jesis. Do, ni vizitis kune la centran parton de la lando, ĉefe la du belegajn urbojn (Unesko monumentoj) Banská Štiavnica kaj Banská Bystrica. Reen, ni vizitis



Jen fame konata vizitanto!



Bunta esperanta procesio

proksime de Nitro, la lignopreĝejon de Hronesk: vere mirinda konstruaĵo! Post la kongreso ni vizitis la tutan landon, kaj ekkomprenis ke estas pluraj lignopreĝejoj, ĉefe en la norda parto, proksime de la ukraina kaj pola limoj. Do: ni maltrafis la teatraĵon, sed ni gajnis novan amikecon, kaj tre bonan ĉiĉeroninon!

Mi ne povas detale prezenti ĉiujn aranĝojn kiujn mi ĉeestis: kiel kutime, koncertojn, teatraĵojn, prelegojn, ktp. Novaĵo estis la ebleco spekti filmojn en esperanto aŭ kun esperantaj subtitoloj dum la tuta kongreso, en speciala salono, seninterrompe. Mi nur volas diri kelkajn vortojn pri interesa kaj amuza prelego de Istvan Ertl kaj

Brian Moon pri la briteliro kaj la novaj eblecoj por esperanto kiel komuna lingvo de la eŭropaj institucioj. Komencante sian prelegon, Istvan diris, tute entuziasma kaj serioza: “Mi havas bonan kaj gravan novaĵon! Mi ĵus eksciis ke la Respubliko de San Marino volas eniri en la Eŭropan Union, kaj ili decidis ke ĝia oficiala lingvo estos esperanto!”. Post kelkaj momentoj de dubo, ni ekkomprenis ke temas pri (inteligenta) ŝerco! Fakte, Istvan volis komprenigi nin, kion signifus tio: ĉiuj landoj de EU estus devigataj lerni esperanton, por traduki la oficialajn tekstojn!

Mi finas tiun raporteton kun la anonco de la venonta UK, kiu okazos en Seulo de la 22-a ĝis la 29 de julio de 2017. La prezidanto de la Korea Esperanto Asocio prezentis en sia prelego plurajn manierojn por vojaĝi al Seŭlo, sed li parolis ĉefe pri sia propra sperto, ĉar li venis al Nitro, kun siaj akompanantoj de la LKK de Seŭlo, trajne! La vojaĝo daŭris 23 tagoj, el Seulo ĝis Moskvo, kun etapoj de pluraj tagoj en urboj, kie ili estis akceptitaj de la lokaj esperantistoj (mi ne bone memoras kiom da haltejoj ne en kiuj urboj de Ĉinio, Mongolio, kaj Rusio). Do, li proponis al la interesotaj fari la saman vojaĝon reen, el Moskvo ĝis Seulo! Krome, li jam anoncis ke unu el la merkredaj ekskursoj estos al Nordo-Koreio!

Vendredon posttagmeze, post la komuna fotado per telegvidataj fotiloj, la tuta esperantistaro marŝis tra la tuta urbo, en bunta marŝado, kun flagoj, banderoj, muziko, bruo, ktp. Ni haltis sur la granda urboplaco, kie okazis la lasta internacia muzikfestivalo ĝis noktomezo.

Finfine, mi renkontis Saeed, nian pakistananan gaston kiu prelegis pasintan jaron en la Universitato de Bordojo: li petis min transdoni al ĉiuj lian varman brakumon.



Elvezio

STAĜOJ



Oktobero 24a- novembro 1a: AŬTUNE - AŬtuna TUmulta NEsto
5-a komuna feriado por infanoj, familioj, geavoj .
Kursoj kaj aliaj aktivajoj, programo por infanoj.

M.C.E. Château de Grésillon, St. Martin d'Arcé 49150 BAUGÉ-EN-ANJOU

Tel.: 02 41 89 10 34 (aŭ 09 51 64 10 34) - Informoj: gresillon.org



Oktobero 24a-28a: Pedagogia staĝo

Katalin Kovats, redaktoro de edukado.net kaj sperta trejnisto de Esperanto-instruistoj gvidos 5-tagan seminarion celantan pripensi kaj praktike prepari intervenojn enkadre de TAP/NAP en la elementaj lernejoj, kaj atelierojn en gimnazioj kaj liceoj.

KVINPETALO Esperanto-Centro, 4 rue du Bureau 86410 BOURESSE

Tel.: 05 49 03 43 14 (aŭ 06 07 31 67 81) - Informoj: kvinpetalo.org

NIAJ KURSOJ

- A **GUJAN-MESTRAS**, le jeudi de 15h à 17h, cours pour débutants, au local attenant au bureau de poste de la Hume, 43 avenue du Marechal de Lattre de Tassigny 33470 Gujan -Mestras (06 95 02 85 00)
- A **CREON**, le jeudi tous les 15 jours de 14h à 16h, cours pour débutants chez Morine STRIDE, 17 rue Voltaire. (06 10 07 08 58)
- En **GALGON**, ĉiun mardon de la 17a ĝis la 19a, Joël LAJUS gvidas kurson por komencantoj kaj progresantoj. (05 57 69 26 96)
- En **CENON** (Kastelo Palmer), ĉiun lundon inter la 14a kaj la 17a, Marcelo REDOULEZ animas tradukgrupon kaj Claudine POMIROL kurson por komencantoj. (05 56 21 38 64)
- En **MONTENDRE**, ĉiun mardon de la 10a ĝis la 12a, Janine Dumoulin gvidas kurson por ĉiuj niveloj. (05 46 49 45 18)
- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono B111, ĉiun merkredon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio kaj Jean-Seb. (06 72 17 22 97)



Kiel Bertono Le Maire estis trompita de Renardo, kaj kiel Renardo estis trompita de Nigreto.

Tion vi ja scias, Nigreto. Centfoje oni ripetis tion al vi. Nu, sen vi, Bertono pagus per sia propra persono. Se li ne havus vin por elaĉeti sian kapon, li nun estus mortinta. Rekuraĝiĝu, amiko Nigreto. Kontraŭ bela kaj glora morto vi kunrestados kun anĝeloj kaj eterne ĝuos vidi Dion mem.

- Mi konsentas, moŝto Renardo, respondis Nigreto. Ne morto min afliktas kaj ribeligas, ĉar ĉiel mi finiĝos kiel Krucistoj, kaj kiel ili mi certas pri bona soldo. Mi afliktiĝas nur pri la kaponoj, miaj karaj amikoj, ĉefe pri tiuj karaj kaj belaj kokinoj kiujn vi vidis laŭlonge de la heĝoj, kaj kiuj, iun tagon, estos manĝitaj sen sama profito pri iliaj animoj. Ek, ni ne plu pensu pri tio. Sed donu al mi kuraĝon, mastro Renardo; ekzemple vi bone agus se vi kantus pian arion por helpi min pli facile eniri Paradizon. Mi forgesus ke mi devas morti kaj tiel mi estus pli bone akceptita inter la beatuloj.

- Ĉu nur tio Nigreto? tuj respondas Renardo. He, kial do vi ne diris tion pli frue? Je fido kiun mi ŝuldas al Hermelina neniu povos aserti ke viadeziro ne estas plenumita. Aŭskultu do!

Tiam Renardo ekkantis novan kanzoneton, kiu ŝajne tre plaĉis al Nigreto. Sed dum li eligis longan noton, Nigreto moviĝas, eskapas, ekflugetas kaj atingas la supron de najbara alta ulmo. Renardo vidas lin, volas haltigi lin, sed jam tro malfrue. Li stariĝas kontraŭ la arbotrunko, saltas kaj ne povas atingi la branĉojn.

- Ha, Nigreto, li diras, tio ne estas bona, mi konstatas, ke vi malice tromp mokis min.

- Ĉu vi tion konstatas? diras Nigreto, nu, ĵus antaŭe, tion vi ne konstatis. Fakte, eblas ke vi malpravis kanti. Do mi ne petas, ke vi plukantu la saman arion. Ĝis, mastro Renardo. Iru ripozu post bona dormo, eble vi trovos alian predon.

Renardo tute konfuzita ne scias kion fari kaj decidi.

-Per Sankta Anna, li diras, pravas la proverbo «bela kantado ruinigas aŭ enuigas». Kaj la nenobelo prave aldonas: «inter la buŝo kaj la kulero ofte staras obstaklo». Tion mi jam spertis. Katono diris ankaŭ: «ne tro paroli por bone festeni» Kial mi ne memoris!

Malproksimiĝante, li ankoraŭ murmuris:

- Malbona kaj stulta tago! Oni diras, ke mi estas ruza, kaj ke bovo ne kapablas plugi kiel mi trompi. Tamen jen malica koko kiu instruas al mi artifikon. Almenaŭ la afero restu sekreta kaj neniu klaĉu ĉe la Kortego. Tuj malfamigis mia reputacio.

FINO de la tria aventuro de Renardo



Desegnis Morin'



ESTRARO
de
« ESPÉRANTO-GIRONDE »

* * * * *

Centre Culturel Château Palmer
33150 CENON
Banque Postale:
347771 F Bordeaux



* * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Rés. Du Prince Noir Bât.D Appt.315
Avenue Sainte-Marie
33400 TALENCE
Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**
2, chemin des Nauves
Chardes 17130 MONTENDRE
Tel: 05 46 49 45 18 / janinedum@neuf.fr

Help-sekretariino: **Morine STRIDE**

Kasistino: **Monique DUSENTY**
76 avenue La Fontaine
33560 CARBON BLANC
Tel: 05 56 06 74 49 / monique.duss@free.fr

* * * * *

Materialon por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al Yannick DUMOULIN: yannickdum@free.fr

